# Ärztlicher Dolmetscher

**Gert Hoyer kaj Uta Hoyer**

**Esperanto**

## Ĝeneralaĵoj

1. Vi troviĝas ĉi tie en kuracistejo. Mi unue metos al vi kelkajn demandojn kaj poste vin ekzamenos.

2. Bonvolu respondi la demandojn per kapjesado aŭ kapneado!

3. Bonvolu skribi la respondojn sur tiun ĉi folion!

4. Ĉi tiu demando havas plurajn respondeblecojn, kiuj estas indikitaj per numeroj. Montru tiom da fingroj, kiom egalas al la trafa nombro!

5. Ĉiuj demandoj validas laŭsence por via malsaniĝinta infano.

6. Bonvolu trankviliĝi. Ni helpos vin.

7. Bonvolu montri, kie!

8. Kiom ofte vi tion ĉiutage rimarkas? Bonvolu tiom da fingroj montri!

9. Kiam tio okazis? Bonvolu skribi la daton (eventuale la jaron)!

10. Kiel longe jam? Bonvolu skribi la daton (eventuale la jaron)!

11. Ĉu vi jam antaŭe iam suferis la nun prezentitajn simptomojn?

12. Vi ŝoforis vian aŭtomobilon sub la influo de alkoholo. Mi devas meti al vi kelkajn demandojn kaj elpreni sangoprovaĵon.

## Personaĵoj

13. Kiel vi nomiĝas (nomo, antaŭnomo)?

14. El kiu lando vi venas?

15. Kiam vi naskiĝis?

16. Kie vi loĝas en via patrolando?

17. Kie vi loĝas en nia lando?

18. Ĉu ĉi tie iu loĝas, kiun vi konas?

19. Kiuj estas nomo kaj adreso de via plej proksima parenco?

20. Ĉu vi deziras, ke ni sendu telegramon / E-poŝton al viaj parencoj?

21. Ĉu vi deziras, ke ni sendu telegramon / E-poŝton al via ambasadejo / konsulejo?

22. Ĉu vi deziras, ke ni informu iun telefone pri via malsano?

23. Bonvolu skribi la tekstojn por la telegramoj / E-poŝtoj.
24. Ĉu vi estas asekurito de malsanula asekurejo?

25. Bonvolu noti la nomon kaj adreson de via asekurejo.

26. Kiam vi envojaĝis en nian landon?

27. Kiel longe vi restos en nia urbo?

28. Kiel longe vi restos en nia lando?

29. Bonvolu montri al mi vian personan legitimilon / pasporton.

30. Ĉu vi estas ano de diplomatia reprezentejo?

## Aktuala anamnezo (ĝenerala)

31. Ĉu vi subite malsaniĝis?

32. Ekde kiam vi estas malsana? Montru tiom da fingroj kiom da semajnoj?

33. Ĉu vi iam antaŭe jam suferis tian malsanon?

34. Bonvolu montri perfingre al la loko de via korpo, kie vi rimarkis la malsanon (simptomojn) unue.

35. Ĉu vi estis lastatempe en aliaj landoj? Se jes, bonvolu enskribi la daton kaj landon.

36. Ĉu vi regule glutas medikamenojn?

37. Ĉu vi povas montri al ni tiujn medikamentojn?
38. Ĉu vi troviĝas en regula kuracista observo? Se jes, kial?
1. Koro 2. Pulmoj 3. Stomako / intestoj 4. Hepato / galveziko 5. Renoj kaj urinveziko 6. Subventraj kaj seksaj organoj 7. Okuloj 8. Kolo, nazo, oreloj 9. Haŭto 10. Nervoj / menso / animo

39. Ĉu vi havis febron? Se jes, bonvolu skribi la plej altan mezuritan gradon kaj kiam tio okazis?

40. Ĉu vi sentas vin elĉerpita kaj laca?

41. Ĉu vi suferis dum la lastaj semajnoj febran infekto-malsanon?

42. Ĉu vi sentas dolorojn?

43. Montru perfingre al la doloranta loko!

44. Kiel estiĝis tiu doloro?
1. Subite, per plena forteco 2. Iom post iom fortiĝanta 3. Subite, spasme, laŭ forteco ŝanĝiĝanta

45. Kie komenciĝis tiuj ĉi doloroj?

46. Ĉu vi ofte sentas kapdolorojn?

47. Ĉu vi bone dormas?

48. Ĉu vi konstatas mankon de apetito?

49. Ĉu vi suferas naŭzon?

50. Ĉu vi havas atakojn de kapturniĝo?

51. Ĉu vi havas konstantan senton de kapturniĝo?

52. Ĉu vi suferas orelan bruon?

53. Ĉu vi kelkfoje svenas / perdas la konscion?

54. Ĉu via haŭto jukas?

55. Ĉu vi estas lastatempe pli ofte ekscitita kaj facile kolerema?

56. Ĉu vi havis embarasojn? Profesiajn aŭ familiajn konfliktojn?

57. Ĉu vi iam suferis nervan kolapson?

58. Ĉu vi lastatempe perdis korpan pezon? Bonvolu noti:
1. Kiom da kilogramoj?
2. Dum kiom da tempo?

59. Ĉu vi jam iam havis alergian reakcion?

60. Ĉu vi estas al io tro reagema?
1. Medikamentoj 2. Sapo aŭ kosmetikaĵoj 3. Certaj plantoj (ekz. primolo) 4. Certaj nutraĵoj (ekz. fiŝo)

61. Ĉu vi suferas en printempo / somero alergian nazkataron aŭ fojnofebron?

62. Ĉu vi iam pli frue havis epilepsiajn konvulsiojn?

63. Ĉu vi konas vian sangogrupon?

64. Kiujn infektajn malsanojn trapasis via infano?
1. Morbilo 2. Skarlatino 3. Parotito 4. Rubeolo 5. Difterio 6. Poliomjelito 7. Varicelo 8. Aliaj infektaj malsanoj:

65. Kontraŭ kiuj malsanoj estas via infano vakcinita?
1. Tetanoso 2. Kokluŝo 3. Difterio 4. Variolo 5. Morbilo 6. Tuberkulozo 7. Poliomjelito 8. Flava febro 9. Aliaj malsanoj:

66. Antaŭ kiom da horoj vi trinkis la lastan alkoholon?

67. Kion vi trinkis?
1. Biero 2. Vino aŭ ĉampano 3. Brando

68. Montru tiom da fingroj, kiom da glasoj vi trinkis!

69. Ĉu vi manĝis
1. antaŭ 2. dum 3. post la enalkoholigo?

**Aktuala anamnezo (speciala)**

70. Ĉu vi havis koratakon?

71. Ĉu vi havis ŝvitoerupcion?

72. Ĉu vi havas internan timosenton?

73. Ĉu vi havis senton de morta angoro / mortotimo, aŭ ne estis tiel rigora?

74. Ĉu vi pli ofte sentas premon surbruste?

75. Ĉu vi rapide senspiriĝas?

76. Ĉu vi suferas pri spirmanko
1. en ripoza situacio 2. dum irado 3. suprenirante ŝtuparon aŭ dum pli forta korpa ŝarĝiĝo 4. nokte post kelkhora dormado, - ĉu tiu ĉi stato pliboniĝas, kiam vi sidiĝas?

77. Ĉu vi en la lasta tempo havis ŝvelantajn krurojn?

78. Ekde kiam vi havas ŝvelantajn krurojn? Montru tiom da fingroj, kiom da monatoj!

79. Ĉu la kruroj nur vespere estas pli dikaj?

80. Ĉu vi devas nokte urini? Kiom ofte? Montru, mi petas tiom da fingroj!

81. Cu via pulso kelkfoje estas
1. tro rapida (pli ol 120-foje en minuto) 2. tro malrapida (malpli ol 35-foje en minuto)?

82. Ĉu vi rimarkas, ke via koro kelkfoje neregule batas?

83. Ĉu vi malsanis pro kormalsano? Se jes, kiu?
1. korinflamo 2. korinfarkto 3. kordifekto konata

84. Ĉu ĉe vi estas konata
1. malalta sangopremo 2. alta sangopremo?

85. Ĉu vi havas diareon? Kiom ofte dum la tago?

86. Ĉu vi havas ordinare regulan fekadon?

87. Ĉu via fekaĵo estas 1. normale formita 2. tre malmola 3. kiel maldensa kaĉo 4. kiel akvo?

88. Ĉu vi ion manĝis, kiu povus kaŭzi la simptomojn?
1. konservojn 2. fiŝon 3. malfreŝan viandon aŭ kolbason 4. fungojn 5. aŭ vi trinkis pli grandajn kvantojn da alkoholo?

89. Ĉu tiuj doloroj dependas de la manĝado? Se jes, ĉu ili ekestas
1. tuj post la manĝado 2. nur iom da tempo post la manĝado?

90. Ĉu vi sentas dolorojn malsatante?

91. Ĉu vi kelkfoje havas acidan rukton?

92. Ĉu vi ofte suferas pro intestaj ventoj?

93. Ĉu regule eliras intestaj ventoj?

94. Ĉu vi vomis? Kiom ofte?

95. Ĉu la vomitaĵo aspektis nigra?

96. Ĉu vi malŝatas iujn manĝaĵojn?
1. grasa viando 2. pizoj, brasiko

97. Kiam estis la lasta fekado? Montru tiom da fingroj kiom da horoj!

98. Kiun koloron havis via lasta fekaĵo?
1. normala 2. normala, bruna kun ruĝetaj surmetaĵoj 3. normala, bruna kun mukaj surmetaĵoj 4. nigra 5. grizoblanka

99. Ĉu via ventro lastatempe plidikiĝis?

100. Ĉu vi iam havis stomakajn ulcerojn?

101. Laŭ via scio, ĉu vi havas
1. galŝtonojn 2. renŝtonojn?

102. Ĉu vi lastatempe havis
1. galvezikan kolikon 2. reno-kolikon?

103. Ekde kiam via haŭto estas flaveta? Montru tiom da fingroj kiom da tagoj!

104. Ĉu vi havas tusadon?

105. Ĉu vi sentas dolorojn dum la tusado?

106. Ĉu vi sentas dolorojn dum la spirado?

107. Ĉu vi havas elsputaĵon? Se jes, kiel ĝi aspektas?
1. grizablanketa 2. flavaverda 3. griza kun ruĝetaj inter-miksaĵoj 4. helruĝa-ŝaŭmeca 5. malhelruĝa

108. Kiam vi lastfoje urinis? Montru tiom da fingroj kiom da horoj!

109. Urinante, ĉu vi devas atendi certan tempon, ĝis kiam la urino elvenas?

110. Kiun koloron via urino havas?
1. hela 2. malhelflava 3. ruĝeta 4. bierobruna

111. Ĉu vi urinante sentas dolorojn aŭ bruldolorjn?

112. Ĉu vi devas pli ofte ol antaŭe urini, nur produktante malmulte da urino?

113. Ĉu viaj patro, patrino aŭ gefratoj suferas pro la sukera malsano (Diabetes mellitus)?

114. Ĉu vi rimarkis lastatempe fortiĝintan soifon?

115. Ĉu vi kuracas vian sukeran malsanon per
1. Insulin-injektoj 2. tablojdoj 3. nur dieto?

116. Ĉu vi post la lasta Insulin-injekto normale manĝis?

117. Ĉu la doloro en via gambo ekestis
1. tute subite, fulmrapide 2. iom post iom?

118. Ĉu la doloroj malpligrandiĝas, kiam la gambo pendas malsupren?

119. Ĉu via kolo dum la lasta jaro plidikiĝis?

120. Ĉu vi falis?

121. Bonvolu provi imite prezenti la akcidentan situacion!

122. Ĉu vi povas detale rememori pri la akcidento?

123. Ĉu vi svenis?

124. Ĉu vi estis tranĉe vundita?

125. Ĉu vi kontuziĝis?

126. Ĉu vi estas batita?

127. Ĉu vi suferis frapon en la ventron?

128. Ĉu vi trapasis trafikan akcidenton?

129. Ĉu vi envolviĝis en la akcidenton kiel
1. piediranto 2. biciklisto 3. motorbiciklisto 4. aŭtomobilisto?

130. Ĉu temas rilate al kun-akcidentuloj pri 1. piedirantoj 2. biciklistoj 3. motorbiciklistoj 4. aŭtomobilistoj 5. tramo 6. trajno?

131. Ĉi vi perdis multe da sango?

132. Ni montras al vi ujon. Ĉu la sangoperdo estis pli granda?

133. Ĉu vi estis mordita de besto?
1. hundo 2. kato 3. serpento 4. vulpo aŭ melo 5. alia besto

134. Ĉu vi brulvundiĝis aŭ brogdifektiĝis?

135. Ĉu la malsana membro eventuale frostdifektiĝis?

136. Ĉu vi vundiĝis en la lasta semajno (ankaŭ se ĝi estis tre eta)?

137. Ĉu vi estas vakcinita kontraŭ tetanoso?

138. Ĉu vi posedas atestilon pri tiu vakcinado?

139. Ĉu vi iam ricevis injekton de besta sero?
1. de ĉevalo 2. de bovo 3. de virŝafo 4. de alia besto

140. Ĉu tiu ĉi doloro aperis ĉe eksterordinara korpomovo aŭ ĉe levo de ŝarĝo subite?

141. Ĉu vi rimarkas pli ofte elnazan sangadon?

142. Ĉu vi konstatas elfluaĵojn el la orelo?

143. Ĉu vi konstatis subitan ĝenon de via aŭdkapableco? Se jes, montru la koncernan orelon.

144. Ĉu vi rimarkas pliiĝintan larmoelfluon?

145. Ĉu vi sentas premon en la okuloj?

146. Montru per la ĝusta nombro da fingroj la de mi skribitan numeron!

147. Ĉu io ŝprucis en viajn okulojn? Ĉu temas pri
1. acidaĵo 2. lesivo 3. nekonata fluidaĵo?

148. Ĉu vi havas perturbojn de via vidkapablo (vualo antaŭ la okuloj)?

149. Ĉu vi povas ekzakte legi tiun skribaĵon?

150. Ĉu vi vidas ĉion duoble?

151. Ĉu insekto pikis vin?

152. Ĉu vi havis lastatempe kontakton kun novaj substancoj?
1. medikamentoj 2. floroj (ekz. primoloj) 3. herboteo, herbolikvoro 4. industriaj substancoj (oleo, graso, solvilo, kolorilo k.s.)

153. Kiam vi havis lastfoje sekskuniĝon?

154. Kion vi unue rimarkis?
1. doloroj, urinante 2. elfluaĵo el urintubo 3. ulceriĝo 4. doloroj en la regiono de la ingveno

155. Kiam okazis la lasta ginekologia ekzameno ĉe vi?

156. Ĉu vi havas elfluon (blenoreo) el la vagino?

157. Ĉu vi regule menstruas? Bonvolu noti por ni
1. post kiom da tagoj (inter-valo) 2. kiom da tagoj ĝi daŭras

158. Ĉu vi ĉiam speciale forte menstruas?

159. Je kiu tago komenciĝis via lasta menstruo?

160. Ĉu vi glutas la kontraŭ-beban pilolon?

161. Ĉu ekzistas la ebleco, ke vi estas graveda?

162. Ĉu vi estas graveda?

163. Kiu estas la monato de via gravedeco?

164. Kiam estas la probabla akuŝtempo?

165. Ekde kiam vi rimarkas la infanomovojn?

166. Ĉu vi konstatis, ke via ventro en la pasinta tempo iom malleviĝis? Kiam tio okazis?

167. Ekde kiam vi rimarkis sangoelfluon?

168. Ĉu vi nepre deziras gardi la gravedecon?

169. Kiom da infanoj vi jam havas?

170. Kiom da misnaskoj vi jam devis toleri?

171. Ĉu la pli fruaj naskoj pasis senkomplike?

172. Ĉu okaze de pli fruaj naskoj vi havis 1. tre malfortajn naskokonvulsiojn 2. cezaran operacion (operacian akuŝon) 3.instrumentan helpon (forcepso, vakuoeltirilo) 4. perinean ŝiriĝon 5. postan sangoelfluon?

173. Ĉu vi konas la sangan formulon (sangogrupon) de la patro de via infano?

174. Ĉu vi konstatis dum la lastaj semajnoj de la gravedeco 1. sangoelfluon 2. kapdolorojn 3. vidoperturbojn (briletado) 4. altigitan sangopremon 5. ŝvelantajn krurojn 6. flaviĝantan haŭton?

175. Ekde kiam vi nun havas regulajn naskokonvulsiojn?

176. Post kiom da minutoj la naskokonvulsioj nun venas?

177. Ĉu jam elfluis feto-fluidaĵo?

178. Ĉu vi sentas la movojn de via infano?

179. Kiam ni donos al vi signon, tiam vi profunde enspiru kaj kunpremegu!

180. Via infano bonfartas.

181. Ĉu vi ricevis elektran baton?

182. Ĉu vi pasigis pli longan tempon sub influo de sun-radiado?

183. Ĉu akcidente vi trinkis nekonatan fluidaĵon?

184. Ĉu vi scias. ĉu temis pri
1. acidaĵo 2. lesivo 3. mastruma kemiaĵo?

185. Ĉu vi glutis pli grandajn kvantojn de la medikamento?

186. Ĉu vi glutis
1. dormigan aŭ trankviligan rimedon 2. kontraŭdoloran rimedon 3. koromedikamenton 4. aliajn medikamentojn?

187. Ĉu vi decidis mem fini vian vivon?

**Propra anamnezo**

188. Se vi suferas je iu el la sekvaj malsanoj, tiam bonvolu montri tiom da fingroj, kiom estas la numero antaŭ la koncerna malsano.

Se vi suferis pro unu el tiuj malsanoj pli frue, tiam notu por ni la jaron!

1. pulmo-tuberkulozo 2. bronka astmo 3. kronika bronkito 4. ulceroj de stomako kaj duodeno 5. galvezikaj malsanoj 6. malsanoj de la pankreato 7. sukera malsano (diabetes mellitus) 8. trombozo 9. embolio 10. preteco al sangado

189. Sekvas ankoraŭ kelkaj malsanoj:
1. glaŭkomo 2. koromalsano 3. sangocirkuladaj perturboj de la

cerebro 4. epilepsio aŭ aliaj konvulsioj 5. alergiaj malsanoj 6. malsanoj de tiroido 7. reŭmatisma febro 8. ostaj frakturoj (Montru kie!) 9. seksaj malsanoj 10. tumoraj malsanoj (Montru kie!)

190. Ĉu vi eventuale povus surskribi, kiel la malsano estas nomita de la kuracistoj de via lando?

191. Ĉu vi jam estas operaciita? Je kiu organo?
1. apendico 2. koro 3. pulmoj 4. stomako 5. galveziko 6. renoj 7. intestoj 8. utero 9. ovarioj 10. urinveziko aŭ prostato

192. Ĉu vi estas informita, ĉu via apendico okaze de alia operacio estis kunpremita?

193. Kian seksomalsanon vi jam havis?
1. gonoreo 2. sifiliso 3. aliaj seksomalsanoj

194. Ĉu iu el via parencaro suferas je bronka astmo aŭ alia alergia malsano?

**Ekzameno**

195. Mi nun deziras vin ekzameni.

196. Bonvolu malfermi la buŝon!

197. Bonvolu senvestigi la supran parton de la korpo!

198. Bonvolu senvestigi la ventron!

199. Bonvolu ambaŭ okulojn larĝe malfermi!

200. Bonvolu kun malfermita buŝo profunde en- kaj elspiri!

201. Bonvolu ne spiri!

202. Estu, mi petas, absolute senstreĉita!

203. Mi nun pripalpas vian ventron. Bonvolu signi, kiam vi sentas doloron!

204. Ĉu doloras, kiam mi frapas ĉi tie?

205. Bonvolu klopodi, imiti miajn movojn ekzakte!

206. Mi antaŭparolos ion. Bonvolu ripeti tiujn sonojn.

207. Bonvolu fiksrigardi mian fingron!

208. Bonvolu iri ĝis tien kaj reen!

209. Mi devas ekzameni vin trans la anuso.

210. Mi devas ekzameni vin trans la vagino.

**Sciigo de pordiagnozaj intervenoj**

211. Ni volas fari por pli bone ekkoni vian malsanon ankoraŭ kelkajn teknikajn kaj laboratoriajn ekzamenojn.

212. Ni volas por pli bona prijuĝo de via koro skribi elektrokardiogramon.

213. Ni volas por pli bona prijuĝo de via cerebra funkciado skribi elektro-encefalogramon.

214. Ni volas mezuri vian korpan temperaturon.

215. Ni volas mezuri vian sangopremon.

216. Ni volas fari rentgen-fotogramon.

217. Ni volas preni el via orela lobo iom da sango por ekzameno.

218. Ni volas preni el via braka vejno iom da sango por ekzameno.

219. Ni volas analizi vian urinon. Bonvolu urini en tiun ĉi ujon.

220. Ni volas analizi vian urinon kaj tial ni devas ĝin elpreni per katetero.

221. Ni devas fari dabon por citologia (ĉela) ekzameno.

222. Ni devas mezuri vian okulan premon. Bonvolu larĝe malfermi ambaŭ okulojn kaj fiksrigardi al tiu ĉi objekto!

223. Ni devas analizi vian fekaĵon. Bonvolu meti mal-grandan peceton de via sekva feko en tiun ĉi ujon!

224. Ni devas analizi vian el-sputaĵon. Bonvolu kraĉi vian elsputaĵon en tiun ĉi ujon!

**Sciigo de plilarĝigita diagnozo**

225. Temas pri
1. osta frakturo (rompiĝo) 2. kontuzmakulo 3. distordo 4. kontuzo 5. artika distordo

226. Vi suferis cerban komocion.

227. Temas pri inflamo.

228. Temas pri absceso.

229. Temas pri infekto-malsano.

230. Temas pri interna malsano. La sekva organo malsanas:
1. koro 2. pulmo 3. stomako 4. intestoj 5.galveziko 6. hepato 7. pankreato 8. reno / urin-veziko 9. internaj seksorganoj

231. Temas pri akuta malsano en la abdomeno.

232. Vi havas infekton pro malvarmumo.

233. Vi estas graveda, verŝajne en la … monato.

234. Vi rapide resaniĝos.

**Sciigo pri terapiaj rimedoj kaj plua kuracado**

235. Mi devas sendi vin al hospitalo.

236. Mi ŝatus sendi vin al hospitalo por observado.

237. Mi sendos vin al specialisto-kuracisto.

238. Vi estos transportata per ambulancaŭto.

239. Vi devas strikte respekti ripozon en lito.

240. Vi ne devas kuŝi en lito, sed povas
1. sidi en fotelo 2. promeni en la ĉambro 3. forlasi la loĝejon.

241. Vi devas esti operaciota. Ĉu vi donas vian konsenton?

242. Ni devas fari kuretadon.

243. Vi ricevos mallongan narkozon.

244. Kiam vi lastfoje manĝis aŭ trinkis? Bonvolu surskribi la horon.

245. Bonvolu preni tiujn medikamentojn en apoteko! Temas pri 1. gutoj 2. tablojdoj 3. draĝeoj (tute gluti) 4. kapsuletoj (tute gluti) 5. suko 6. ungvento

246. Vi devas apliki la medikamenton, tiel kiel mi ĝin notis sur tiu ĉi folieto.

247. Vi devas surmeti la ungventon … foje dumtage.

248. Mi surskribis por vi gutojn. Bonvolu meti ĉiutage … foje … gutojn en la
1. okulon 2. orelon 3. nazo-truojn.

249. Vi devas provizore atenti dieton kaj nur rajtas manĝi aŭ trinki 1. teon (kamomilo aŭ pipromento) 2. biskviton 3. farunaĵsupon 4. rostitan panon 5. Mi donos al vi indikilon.

250. Bonvolu ne manĝi aŭ trinki dum la sekvaj … horoj!

251. Ni devas fari stomakan gargaron.

252. Ni devas enmeti kateteron.

253. Ni devas tranĉi por forfluigi la puson.

254. Vi nun ricevas lokigitan narkozon.

255. Ni nun surmetas ban-daĝon.

256. Ni nun surmetos gipso-bandaĝon.

257. Ni kudris vian vundon. La fadenoj devas esti eltiritaj je la …

258. La bandaĝo devos esti ŝanĝita je la ...

259. Vi ne rajtas paroli unu vorton, eĉ ne flustri!

260. Vi nun ricevos injekton kontraŭdoloran.

261. Vi devas vakciniĝi kontraŭ
1. tetanoso 2. rabio 3. …

262. Bonvolu tuj doni al ni signon, kiam vi sentas iun ajn ŝanĝiĝon (ekz. korrapidiĝemo, missentoj en la brakoj, varmecosento, ekscito, ktp.)

263. Vi estas infekta.

264. Vi ne rajtas havi sekskuniĝon!
Vi ne rajtas trinki alkoholon!

Ĉiuj personoj, kun kiuj vi sekskuniĝis, devas esti kuracataj.

265. Vi devas rekonsulti min je la … !

266. Bonvolu iri en via patrolando al kuracisto,
1. internisto 2. kirurgo 3. ginekologo 4. pediatro 5. dermatologo 6. oftalmologo 7. otorinolaringologo 8. neŭro-logo 9. psikiatro 10. stomato-logo

267. Mi donos al vi leteron por via kuracisto.

268. Vi povas senriske kaj senhezite hejmenvojaĝi per
1. trajno 2. aŭtomobilo 3. aviadilo

269. Vi nun povas adiaŭi.

270. Ĉu vi deziras, ke ni mendu taksion?

271. Bonvolu atendi, vi estos transportata per ambulancaŭto hejmen.

**Volontuloj de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) kun permeso de la aŭtoroj D-ro Gert Hoyer kaj D-rino Uta Hoyer pretigis tiun ĉi kajeron por helpi la rifuĝintojn de la XXI-a jarcento.**

**La Estraro de UMEA dankas pro la altruisma laboro al la aŭtoroj kaj kontribuintoj.**

**Oni rajtas individue por ne-komercaj celoj kopii tiun ĉi tekston tiom ofte, kiom necesas. Por komerca uzo la kopirajto estas ĉe UMEA.**

**Ligilo de la UMEA-retejo:**

**http://umea.fontoj.net/projektoj**

**Ligilo de la Eldonejo Springer:**

**https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-662-48739-6**